


La Brita Esperantisto

Majo-Junio 1986



PIF

... nu, veni !

ZAGREB - V. GORICA - ŠISAK - PULA

24.08.-01.09.1986

(Vd. paĝon 140)

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

82A Jaro, N-Roĝ70

Majo-Junio 1986

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaĝa el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn ‘Esperanto News’ kaj ‘La Brita Esperantisto’. Abono nur al ‘La Brita Esperantisto’ estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, ‘intensive’ kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

LA 70-a BRITA KONGRESO EN LOUGHBOROUGH

La plej granda parto de la 160 homoj kiuj iris al Loughborough por la 70-a Kongreso de la 28-a ĝis la 31-a de marto jam sciis kiamaniere la evento evoluos laŭ tradiciaj gvidlinioj kiuj, dum la jaroj, ne ŝaangiĝis, aŭ se jes, nur malmulte. Ĝi okazis en la tereno de la Universitato, kiu troviĝas je la okcidenta parto de la urbo kaj okupas preskaŭ la saman etendon kiel la urbo mem. Oni ne scias ĉu favori kongresojn en universitataj terenoj, kie oni povas intermiksi ku la samideanoj la tutan tempon, aŭ tiujn kun kongresejo en la centro de urbo kie la partoprenantoj iras por loĝi kaj manĝi en hoteloj kaj restoracioj. En Loughborough la urbanoj ne konstatis ke kongreso okazas en la Universitato almenaŭ se ili legis la urban ĵurnalon.

Je vendredo vespere la 28-a, la Urbestro de Charnwood, distrikta konsilio kiu inkluzivas la urbeton de Loughborough, akceptis nin ĉe la Urbodomo kaj afable gastigis nin. La etoso estis tre agrabla kaj per helpo de regalita vino la kongresanoj interkonatiĝis aŭ reinterkonatiĝis! Laŭ la programo, post la urbodoma akcepto okazis "Interkona Horo" en la Komuna Ĉambro de la Universitato sed multaj renkontinte amikojn, ĉu novajn ĉu malnovajn, iris al la agrabla trinkejo en la kongresejo.

Eĉ se kiel dirite, la gvidlinioj de ĉiu kongreso sekvas unu la alian, iam estas ero aŭ trajto kiu diferencigas ilin. Ĉi tiu jaro ĝi estis la kvar altkvalitaj prelegoj. Tri estis prezentitaj de S-ro Röllinger, ili estis: "Sur la Spuro de l'Homo Prahistoria", "Per Balono al la Poluso" kaj "La Kalifo en Eŭropo". Iuj homoj maltrafis la unuan prezentitan je vendredo posttagmeze, pro malfrua alveno, dum aliaj maltrafis la lastan prezentitan je lundo vespere, pro frua foriro. La kvara prelego estis tiu far de D-ino Boulton pri "La Vortostoko de Esperanto". Ŝi majstre traktis la temon kaj la granda intereso de la kongresanoj pri

la prelego evidentiĝis pro la plenpleno de la ĉambro. Kial la organizantoj ne prezentis ĝin en la sama ĉambro kiel tiuj de S-ro Röllinger restos, sendube, mistero. Dum la tri prelegoj pri historiaj temoj montris la uzadon de la lingvo en tiu kampo, mi opinias ke almenaŭ unu prelego kiu temas precize pri Esperantologio devos okazi en ĉiu kongreso, kie, nature, interesantoj pri la temo ĉeestas; oni ne povas akiri ĉi tiun informon ekster la movado, kaj eĉ klubaj aŭ federaciaj renkontiĝoj ne provizas sufiĉe da publiko por pravigi la preparajn penojn de alta prelego.

Antaŭ pluraj jaroj D-ro Cavanagh ekstartis konversacian rondon por hezitemaj parolantoj kaj en Loughborough ĉi tiu ero ankaŭ aperis sub la gvidado de Steve Thompson. Alia populara ero kiu nun aperas en kongresoj estas komuna kantado kun la ĥoro de la Londona Klubo kaj mi kredas ke ĝi aperos denove en la kongreso de 1987.

La balo estis tre agrabla kun bona bando; la salono tre taŭga por la evento, kun sufiĉe da seĝoj kaj tabloj por la spektantoj kaj ankaŭ bona spaco por danci. La oficiala vespermanĝo daŭris pli longe ol anticipite kaj konsekvence la bala komenciĝo malfruiĝis. La Urbestro kaj Urbestriino de Charnwood estis gastoj por la vespermanĝo kaj la balo. Ili amike kaj afable babilis kun la gekongresanoj.

La kunveno pri la "Esperanto-Hotelo", nun funkcianta en Morecombe allogis multajn homojn kaj la ĉambro plenpleniĝis. Oni ankoraŭ miras pri la fervoro de Mary Davies kiu tiel persiste kaj forte laboris por krei Esperantogastejon en Britio. Ankaŭ okazis kunvenoj de fakaj organizaĵoj, kiuj kiel en pasintaj jaroj produktis plendojn pro kolizioj inter la horoj de la kunvenoj.

Dimanĉo komenciĝis per ekumena diservo; ĉijare pli da homoj ĝin ĉeestis ol

kutime, eble ĉar ĝi okazis en la Kongresejo. Je la vespero ni ricevis koncerton kun kantado, deklamado, skeĉoj kaj la horo de la Londona Klubo. Domaĝo estis trovi en bona koncerto eron pli taŭgan por klubo rondo kie oni povas, kaj devas, toleri la provojn de komencantoj. La jarkunvenoj de B.E.A. kaj E.A.B. ankaŭ okazis ĉi tiun tagon.

Je lundo ni denove havis plenan programon. Iuj ekskursis dum aliaj restis en la Universitato por partopreni popol-dancadon, babilo aŭ kunveni. Dum la vespero S-ro Röllinger prezentis sian trian prelegon, kiun sekvis la dankoj kaj transdono de la flago al ano de la L.K.K. por Abergavenny en 1987.

Antaŭ la Kongreso oni plendis pri la kosto de la vespermanĝo opiniante ĝin alta, sen je la fino multaj partoprenis ĝin! Kaj kiel fino de ĉi tiu rapida raporto, mi volas registri ke je dimanĉo matene neĝis; ĉu antaŭe neĝis dum brita kongreso?

Amador Diaz

PUPTEATRA FESTIVALO

Esperanto en 1986 aĝas 99 jarojn. Dum 19 el 99 jaroj, helpis per pruvoj konfirmi ĝian vivon kaj viglon eta kultura aranĝo en Zagreb, Jugoslavio. En la maro de grandaj eventoj, kiuj nin ĉirkaŭas, ĝi eble ŝajnas sensignifa.

Temas pri teatra festivalo, pri pupteatra eĉ. PIF – Pupteatra Internacia Festivalo – estas ĝia nomo.

Dum la komencaj jaroj oni ignoris la aranĝon, moketante kaj la arton kaj la lingvon, en kiu ĝi okazas. Sed post 18 jaroj, post pli ol 1000 teatraĵoj, PIF gajnis simpatian de la ordinara publiko kaj de moŝtuloj, kiuj pri ĝiaj financoj decidis. Tiel povis okazi, ke PIF en 1985 havis pli ol 20,000 spektantojn. Bedaŭrinde nur eta nombro inter ili estis esperantistoj. Paradokse, pri tiu ĉi esence esperanta aranĝo komencis en la lastaj jaroj grand-nombre interesiĝi esperantistoj.

De diversaj kulturaj instancoj en la

lando PIF en 1985 ricevis subvencian ekvivalenton de 50,000 guldenoj (£12,500!). Por kompreni ĝian prestiĝon, klopodu kompari la subvencion kun tiuj de aliaj Esperanto-aranĝoj en aliaj mondpartoj.

En 1986 PIF okazos en aŭgusto: 23-31. La prezentaĵoj en Esperanto okazos nur en la unuaj tagoj de PIF: 23-27 de aŭgusto. Por la programo de la 19a PIF anoncis sin 65 teatroj el 16 landoj. Nur triono el ili estos akceptita en la festivalan programon.

Se Pekino estas tro malproksima por via poŝo, regalu vin per halto en Zagreb. Se vi bezonas la animan kaj lingvan kuraĝigon antaŭ la 100-jariĝo de Esperanto, eble tio estus trafa elekto. Jugoslavio ne estas tro multekosta lando. En Zagreb Esperanto havas longan tradicion kaj vigran kaj multflankan nunon. Gustumu ĝin!

La organizanto de PIF, Internacia Kultura Servo (p.f.499, YU-41000 Zagreb) je via peto volonte sendos la aligilon.

UNU-TAGA KURSO EN BANGOR

Je la oka de marto okazis en la Studenta Domo de la Universitato Bangor unu-taga kurso pri Esperanto, kiu celis plejparte lernantojn aŭ komencantojn, kiuj ne povas partopreni en vespera kurso. Speciale emfazita estis la parolata lingvo, kaj la etoso estis neformala kaj ĝinda.

Ceestis rimarkaĵa nombro de komencantoj aŭ ĵus-komencintoj – proksimume duono el la tridek ok partoprenantoj – kaj multaj junuloj.

Instruis kvar kursgvidantoj, du de komencantoj, unu de klaso por lernantoj kaj unu de la progresantoj. Krom kvar studperiodoj okazis paroladaro sub la titolo 'Kiel uzi Esperanton?' Sinjoro T. Carr faris interesan paroladeton pri la poezio Esperantlingva, kaj Sinjoro Fowden pri sia peresperanta vizito al Francujo. Ankau Eŭroparlamentano Beata Brookes, subtenanto de Esperanto, vizitis por gratuli kaj kuraĝigi al la partoprenantoj kaj al speciale la organizintoj.

TRADUK-KONKURSO

Laŭpromese ni proponas al vi novan traduk-konkurson. Ni invitas vin traduki en anglan lingvon la ŝuban tekston. Temas pri la unuaj pagoj de la elstara originala romano "Ombro sur interna pejzaĝo" de Spomenka Stimec (Edistudio, 1984). Libropremion ricevos la sendinto de tiu traduko, kiun la redaktoro juĝos plej sukcesa. Sendu vian tradukon al la redakcia adreso. Limdato: la 26a de julio, 1986.

Mi fartis iom kiel uzita glubendo kiun oni klopodas reuzi sed ĝi ne plu fikstenis. Eĉ pli malbone – mi sentis kiel oni disŝiras min de la fono kun tuta amaso da polveroj kiuj malhelpas min. – Kial vi permesis? Kial vi lasis vin tiom glui? – malicis iu voĉo en mi dum nia "ni" perforte degluiĝis al "li" kaj "mi". Perforte? Ne precize. Mi bezonis forton por elgluiĝi. Li ne. Aŭ li multe malpli.

Estis vespero senkurenta. Io misfunkciis, mi serĉis kandelojn tra mallumo. Mi trovis ilin. Ankaŭ alumetojn. Li peze sidis ĉetable. Mi parolis pri negravaĵoj, senkonjekte. Li pronancis mian nomon kaj mi lasis kandelojn kaj turnis min al li. Estis io maltrankviliga en lia voĉo. Mi tuj komprenis, terurita. Sed mi ne volis kredi. Mi ne emis kompreni.

Mi staris en koridoro dum li prenis mantelon. Mi rigardis kiel li surmetas dekstran kaj poste maldekstran manikon. Mi volis ke butonumado longe daŭru. Ĝi estis tre rapide finita. Nenia interveno. Li faris du paŝojn al mi kaj ĉirkaŭbrakis min supraje. Kompreneble mi faris tion kio estas la plej hontinda tiukaze: mi ploris. Mi vidis kiel du larmgutoj enfalis en la pelton de lia jako – li rapide malgluiĝis de mi kaj ekiris grandpaŝe. La pordo fermiĝis; mi aŭdis liajn ŝuojn grinci, enirpordon malfermiĝi, fermiĝi. Mi scias kiel li marŝas laŭ vojeto antaŭ la domo kaj turnas sin kaj foriras. Foriras.

Fakte, tiu vespero kun kandeloj ne venis subite. Mi jam kelkan tempon

sentis ke ni marŝas deklivon malsupren. Kial? Kial entute ĉesas rilatoj?

Mi memoras Tolstoj. Tion pri feliĉaj kaj malfeliĉaj familioj. "Ĉiu feliĉa familio similas unu al alia. Ĉiu malfeliĉa estas malfeliĉa laŭ sia maniero".

– Nun via vico por malfeliĉo. Tio al ĉiuj okazas! – ĝeneraligis tiu voĉo en mi kiu ĝuis vundante.

Bonvolu nur. Deklivo malsupren.

Dum montogrimpado mi eĉ ŝatis tiun momenton kiam mi sentis puŝata min gravite malsupren. Se oni ŝatas – estas agrabla sento kuri de montopinto suben. Se oni ne ŝatas, muskoloj onin dolorigas pro klopodo bremsi. Mi bremsis. Sed mi tamen malgrimpis.

* * *

Kio nun?

La domo pleniĝis per silento, kiu ĉegorge premis. Kio nun? Kio nun? La malplena demando palperĉeris savelirejon.

– Reiru kuirejen! Komencu ion fari! – Iu el mi milde diktis ordonojn.

– Jen la kuirejo, puŝu la pordon. – mi vidis la vazaron malpuran kaj volis ĝin lavi. Sed subite mi ne plu kapablis stari. La tristo pleniĝis miajn maleolojn kaj mi devis sidiĝi sur la plej proksiman seĝon. Trans ĝi vakis lia malplena loko. Mi atendis kelkajn momentojn. Antaŭ ol mi sufokiĝis pro silento revenis hejmen la ironia voĉo kaj deklaris solene: – Antaŭen al malfeliĉo! – Vidante min sidi senmove, ĝi komprenis, ke tiu solena tono estas tamen troigo. Sed ĝi ne pardonpetis.

– Klopodu movi la kapon dekstren – maldekstren! – Mi faris. Ne pro mia plezuro sed por montri, ke mi provas kunlabori. Kaj ĝi kuraĝigis min ĉesi sidi, kaj puŝis min ĝis la lavujo kun malpuraj teleroj.

Ĉe la renkontiĝo kun lia tetaso mi kapitulacis. Aŭ ĉu tio estis kapitulaco de la voĉo?

Ĉu meti min en liton?

Ĉu telefoni al iu amikino?

La voĉo estis tre bonkondata. Mi kredis antaŭe, ke ĝi nur ironion konas. Ĝi densigis malhelon en mia ĉambro kaj senlace glatigis litotukojn batalante kun mi kontraŭ sendormo kaj maldormo. Ni rondpromenis tra la ĉambro kaj trinkis akvon kun. Matene ni ambaŭ havis violkolorajn ringojn ĉirkaŭ okuloj. Nur la miaj estis iom pli malhelaj.

MI VERE BEZONAS PLI GRANDAN DOMON

de
Sandra Slade

Plaĉas al mi priskribi al vi la plej interesajn erojn en miaj kolektoj. La plej malnova libro kiun mi posedas datiĝas de 1810; ĝia titolo estas "La Malnova Biendomo", kaj ĝi estis verkita de Charlotte Smith. Mi ja komencis legi ĝin, sed mi opinias, ke la verkado de la frua 19a jarcento estas iafoje iom malfacila por legi nuntempe, kaj ĝi estas tre multvorta libro. Tamen, mi povas ĉiam peni denove!

Unu el miaj preferataj libroj estas 1863-eldono de la "Ora Trezorejo de Palgrave", tre fama libro de poezio. Nu, mi aŭdis, ke, se ĝi estus eldono de 1861, ĝi povus esti tute multvalora – mi estis iomete misŝanca, ĉu ne! Mi havas eldonon el 1892 de la "Sherlock Holmes" romano, "Etudo en Skarlato", kaj kelkajn infanolibrojn el la malfrua 19a kaj frua 20a jarcentoj. Ne kredu, ke mi havas multe da mono – mi aĉetis la tuton de ĉi tiuj libroj, krom la "Ora Trezorejo" (kaj tre interesa ekzemplero de la "Eseoj de Addison") en Oxfam-butikoj en Londono kaj aliloke. Estas surprize, kion vi povas trovi se vi nur tenas viajn okulojn malfermitaj.

Mi posedas poŝtmarkalbumon kiu apartenis al mia patro kiam li estis knabeto. La mondo ŝanĝiĝis ekde tiuj tagoj, kaj multaj el la nomoj de la landoj ne plu ekzistas. Mia preferata poŝtmarko estas el Novegujo – la bildo estas de knabeto vestita en beba ludvesto, kun

malgranda lana ĉapelo kaj koltuko, kiu staras en la neĝo. Ĝi datiĝas de Kristnasko, 1929.

Miaj pupoj venas el pluraj landoj – Jugoslavio, Nederlando, Hispanujo, Germanujo, Aŭstrio, Bulgarujo, Sovetio, Meksikio ktp. La plej neordinara pupo venas el Usono; ĝi estas Eskima pupo vestita en peltaj vestoj kaj portanta padelon por kanuo. Kiam ajn mi vizitas aliajn landojn mi ĉiam aĉetas alian pupon por mia kolekto; mi ankaŭ aĉetas amason da belaj bildkartoj por miaj albumoj. Miaj geplumamikoj sendas ilin al mi ankaŭ, kaj kelkaj el miaj amikinoj ĉiam memoras sendi al mi bildkarton kiam ili ferias, do ĉi tiu kolekto kreskas la tutan tempon.

Antaŭ nelonge mia avo donis al mi skatolon plenan de fotoj kaj malnovaj revuoj, kiuj estas treege interesaj. Unu el la revuoj temas pri la Reĝino Mary, kaj du el ili temas pri la kronado kiu okazis en 1937. Sed sendube mia preferata kolekto estas la familiaj fotoj. Miaj gepraavoj kaj iliaj tri filinoj estis geaktoroj; fakte, miaj gepraavoj havis teatro-trupon, kaj ili rondvojaĝis en Anglujo kaj Kimrujo dum multaj jaroj, do mi havas plurajn fotojn de ili en kiuj ili estas vestitaj en teatraj kostumoj – por ferakonta spektaklo, melodramo ktp. El ĉiuj el la fotoj, eble la foto kiun mi plej amas estas de mia avino kaj de mia praonklino kiam ili estis knabinetoj. En ĉi tiu foto, mia avino havas proksimume 4 jarojn kaj mia praonklino estas proksimume unu jaron pli juna. Ili staras, tenante la manojn, sur scenejo, rigardante la fotografilon kaj aspektante tre solenaj. Ĝi devas datiĝi de 1914 aŭ ĉirkaŭe.

Mia avino donis al mi multajn librojn, kaj mi kredas, ke mi heredis tiun amon de ŝi. Kio revenigas min al mia unua temo en ĉi tiu artikolo! Kompreneble, nun mi volas komenci kolekton kiu temas pri Esperanto kaj ĝia historio.

Mi povus verki artikolojn pri ĉiuj miaj kolektoj, sed mi finos nun antaŭ ol mi tedos vin tro multe!

AŬRORA KANTO

Philip Larkin

Mi tage laboradas, nokte duonebrias,
 Je l' kvara, al sensona gvatad', vekigās mi jam.
 La kurtenrandojn iam poste la helo strios.
 Ĝis tiam mi vidadas, kio ĉeestas ĉiam:
 La senripoza morto, jam tagon pli proksimen,
 Pensadon malebligas, krom tio, kiel mi mem
 Kaj kie, kiam, mortos. Esploro senfutura;
 Sed timo pri mortigo, kaj pri la morta stato,
 Ĉiam per freŝa bato
 Flagras denove kroĉa, timiga kaj terura.

La menso pro la fulmo vakiĝas. Ne bedaŭre
 – Pro l' bono nefarita, am' ne donita, tempo
 Ŝirita neuzite – nek en mizer' ĉar daŭre
 Grimpadi tra viv' unuopa sub urĝa prem' pro
 Malĝusta komenciĝo, eble neniam kvita;
 Sed pro l' malplen' kompleta, eterne nespertita,
 La nepra estingiĝo al kiu ni koĉeras,
 En kiu ni perdiĝos ĉiame. Ne ĉi tie,
 Ne plu estadi ie,
 Kaj baldaŭ; pli teruras nenio, aŭ pli veras.

Ĉi maniero timi ja estas tut-unika,
 Sen tromp-ebleco. Iam provadis religio.
 Tiu tine-mordita vasta brodaĵ' muzika,
 Kreita por ŝajnigi, ke ni senmortas, tio
 Plej belaspekta, kiu diras *La hom' racia*
Ne timas, kion ĝi ne traspertos, ne konscia,
 Ke nin timigas ĝuste tio – malvid', malsono,
 Nek tuŝo, gusto, flaro – neniam pensrimedo,
 Nek amo nek posedo,
 La anestezi', post kiu neniam venos kono.

Kaj do ĝi restas ĝuste ĉe l' pensorando, eta
 Makulo senfokusa, frideg' neniamĉesa,
 Impulsojn lantiganta ĝis ŝanceliĝ' kompleta.
 Alia povas manki: sed tiu estas jesa,
 Kaj la konstato pri ĝi kolereksplode krizas
 En forna timo, kiam la vivo nin surprizas
 Sen homoj aŭ trinkaĵoj. Kuraĝo ne potencas,
 Nur ne timigas aliulojn. Kuraĝaplombo
 Ne savas de la tombo.
 Frontate aŭ plendate, la mort' ne diferencas.

Fortiĝas lante lumo, la ĉambro ekvideblas.
 Klaras kiel vestŝranko tio, kion ni scias,
 Ĉiame sciiis, scias, kio senfuĝe nepras.
 Neakceptite. Unu flankon ja cedo prias.
 Dume la telefonoj kaŭre sonoropretas
 En la fermitaj oficejoj, kaj sin elmetas

Vekiĝe la komplika luita mond' sentriste.
 Argile blankas la ĉielo, sen suna oro.
 Farendas la laboro.
 Poŝtistoj iras de dom' al domo kuraciste.

el la angla: W. Auld

HISTORIA SOCIETO

Dum la pasintaj sep jaroj mi pli kaj pli interesiĝis pri historio kaj eĉ verkis kelkajn artikolojn por fakaj revuoj. Historiisto, ĉu amatora kiel mi, ĉu profesia, kontentigas sin per tri plezuroj. Unue li/ŝi serĉas kaj trovas novan materialon ekz. taglibrojn kaj neeldonitajn leterojn. Due estas plezuro kritike pritrakti tiun novan materialon, ne nur por rakonti tion, kio okazis, sed por lumigi la motivojn de la rolantoj. Trie estas plezurige diskonigi la rezultojn de la esplorado.

Kiu plej bone konas la pejzaĝon de iu regiono, ĉu la piloto de *Concorde* kiu flugas regule super ĝi kaj vidas ankaŭ la pejzaĝon de multaj aliaj landoj, ĉu simpla kamparano, kiu pasigis tutan vivon en unu valo kaj intime konas ĝin? Laŭ mi, ambaŭ povas kontribui ion al la priskribo de pejzaĝo. Estas same rilate la historion de la Esperanto-movado. Estus interese lerni pri la historio de loka grupo en ekzemple Liverpool kaj ankaŭ pri la sinteno de iu landa movado kiam minacas milito.

Mi opinias, ke la tempo alvenis por starigi societon, kiu dediĉos sin ekskluzive al la preskaŭ centjara historio de Esperanto. Ni bezonas ankaŭ fakan revuon pri la temo.

Se montriĝos suface da intereso, estus taŭge lanĉi novan fakan societon dum la jubilea jaro, aŭ en Londono aŭ en Abergavenny. Mi bonvenigus komentojn pri ĉi-tiu propono. Ne nur ideojn sed ankaŭ financan subtenon bonvenigus mia kolego Eric Fowden, 64 Bryn Castell, CONWY, Gwynedd, LL32 8LF.

**Hilary Chapman,
 34 Llwyn Estyn,**

De ganwy, Gwynedd, LL31 9RA.

La funebra solenaĵo de Scyld

(Beowulf, l. 32-52)

Barko enhavene bukloprua staris,
 frosta, foravida, por fama nobelo,
 fonto de ringoj, de festoj en halo.
 Mastron apud maston metis fideluloj
 en ŝiposino. Ŝarĝojn multajn
 ili tien altiris laŭ tiom da vojoj.
 Ne aŭdis mi pri iu pli ornamita kilo,
 per mordaj glavoj kaj per garnoj de milito;
 kaskoj kaj lancoj kuŝis sursine;
 gemoj grandnombraj el golfo veliros
 por preterpasi sub povo de l'maro.
 Neniom malpli decajn faraĵojn ili donis
 ol kiom samajn specojn ja sendis tiuj,
 kiuj lin ĉe eko sur ondoj lanĉis
 kune kun neniuj, knabon nuran.
 Ankaŭ ili fiksis oran flagon
 super kara kapo; lasis kilon iri,
 tajdon teni. Trajtoj malheliĝis,
 koroj krevis. Konas neniuj,
 halkamarado, homo sub ĉielo,
 kien certe celis kargo.

(tradukis en Esperanton J. R. Lambert)

TAKSO

Mi ne alte taksas vin;
 Mi ne alte taksas min;
 Ĉar en mondo de senfin'
 Ĉio nululigas nin.
 Mi tre alte taksas vin,
 Ĉar mi alte taksas min;
 Eternul' kun sensoj kvin,
 Kaj finita kaj sen fin'.

Don Lord

DEK SES REGULOJ

Scipovi la lingvon,
 Laŭdire: facilo,
 Bezonas memoron,
 Reguloj: dekmilo.

Meta Auld

Ĉiutaga Esperanto

LA FATRASA GENERACIO KAJ LA
ASTRONAŬTOJ*(The Junk Generation and the Astronauts)*

“Ĉu vi legis tiun fiartikolon pri la ‘fatraŝa generacio’? La verkinto celis nin.”

“Sendube li estas maljunulo, kiu ne plu scias sin amuzi (*enjoy himself*). Al ni la estonteco!”

“Kiel mia patro, tiu estus ĉe si en la arkeo (*Noah's ark*).”

“Vi troigas.”

“Ho ne! Eĉ mia avino pli komprenas ol Paĉjo. Li kredas, ke la nuna junularo estas mallaborema, narkotema, nenionfarema, kaj fervora pri nur unu afero: resti por ĉiam subvenciate senlabora (*out of work on the dole*). Li diris antaŭ nelonge, ke la plej granda bono por la ‘patrujo’ estus la reenkonduko de konskripcio. ‘Tio reestigis la disciplinon!’ Li tion kredas. Sed, diable, li mem estis tro juna por deĵori en la armeo (*forces*).”

“Forgesu lin! Ĉu vi deziras vidi mian kaseton?”

“Vidkaseton (*video cassette*)?”

“Evidente, alie vi ne povus vidi ĝin, ĉu? Idioto!”

“Pri kio do ĝi temas?”

“Lanĉo de novtipa raketo en Usono. Nu, ĝi estis nova, kiam oni faris la bendon. La sciencinstruisto pruntis ĝin al mi por la semajnfino. Vi memoras lin – la novan: Makleĵno.”

“Flatulaĉo (*creep*)!”

“Ho jes! Kaj kiu fariĝis disciplinisto (*prefect*) je la fino de la aŭtuna trimestro (*term*)?”

“Pro mia futbala lerteco.”

“Kaj kiu gimnastis (*did P.E.*) post la tagmanĝo ĉiun tagon, por ke la gimnastikisto lin rimarku kaj favoru (*take an interest in*)?”

“Fermu la faŭkon!”

“Fermu la vian! Ĉu vi volas spekti la bendon aŭ ne?”

“Nepre.”

“Do . . .”

La voĉo de raportisto (*commentator*) aŭdiĝas de la aparato (*set*):

“Kaj nun la junaj astronautoj en spackombineo (*space suits*) iras la lanĉejon (*launch site*). La ĝis nun plej granda raketo atendas ilin. Dum la tuta pasinta semajno teknikistoj (*technicians*) ĝustigis (*made adjustments to*) difektojn de la brulaĵcisterno (*fuel tank*) kaj de la lanĉa rulponto (*gantry*). Nenion oni hazardu (*nothing must be left to chance*). Se estus unu erareto, unu difekteto, la fluidaj oksigeno kaj hidrogeno povus kunmiksiĝi tro baldaŭ, kaj la eksplodo mortigus ne nur la spacŝipanaron, sed ankaŭ la teknikistojn ankoraŭ najbare de (*in the vicinity of*) la lanĉejo.

Jen la komandejo, de kie oni dissendos instrukciojn . . .

Nun la ĉefastronaŭto paŭzas por ion diri al teknikisto, ridetas, mansvingas, kaj – nun, ek al la raketo! Kiel malgrandaĵ la homoj aspektas apud tiu raketo! Ĝi etigas (*dwarfs*) ĉion.

Ĉiu eniras, kaj la rulponto retiriĝas. Jen, la unuaj flamoj, la raketo malrapide leviĝas, pli rapide; ho, kiel bele, precize en la ĝusta direkto (*right on course*)! Baldaŭ la raketo forfaligos la –”

“Peston! Kial via aparato paneis?”

“Mi ne scias. Ĝi bone funkciis hieraŭ.”

“Ĉu misas la bendo aŭ la aparato?”

“Kiel mi scius? Paĉjo min murdos, se la aparato paneis. Mi ne petis lian permeson pruntepreni la vidbendilon. Ne sole via patro opinias, ke ni estas sentaŭguloj. Kaj se la bendo difektiĝis, kion mi diros al Makleĵno? Mi povas aŭdi lian voĉon nun: ‘Braŭn, mi konfidis (*entrusted*) al vi tre valoran kaj nerekhaveblan bendon, kondiĉe ke vi ĝin gardos, kaj nur post via certigo, ke vi vere scipovas uzi vidbendilon (*video recorder*). Kaj kio okazis? . . .’

“Hej! Vi bele imitas lin. Dank’ al Dio, ke mi ne estas en ties klaso. Nu, malŝaltu la aparaton, kaj forgesu la aferon ĝis morgaŭ. Vi ne havas ĉe vi cigaredon, ĉu?”

“Narkotemulo!”

“Vandalismulo!”

“Mi?”

“Vi paneigis la aparaton ĉu ne? Sed kial disputi (*argue*)? Mi iru hejmen kaj ellernu la germanajn verbojn. Ĉe la lasta ekzameno mi ricevis preskaŭ nenion, kaj se mi ne abiturientiĝos (*get my A-levels*), mia patro certe parolaĉos pri la ‘fatrasa generacio’.”

Don Lord

LA VERDA PIRAMIDO

La ĉefa programero de nia lasta federacia kunveno estis prelego far la Konsilanto, kiu reprezentas nin ĉe E-AB. Li prelegis pri la organizado de la monda Esperanto-movado kaj klarigis kiamaniere formuliĝas la labor-projektoj por la antaŭeniĝo de la lingvo, kiamaniere oni prezentas niajn agojn al internaciaj instancoj, kiamaniere eviti fuŝaĵojn far de asocioj, ĉu naciaj, ĉu fakaj, regionaj, k. t. p., k. t. p. Je la finiĝo de la formulado, konsilado kaj kontaktado, estaĵo ĉe la kuspido rigardas por certigi ke ĉio estas bone farita. Jes tiu konsila potenco estas ĉe la pinto, ĉe la kuspido, ĉar laŭ la preleginto, nia movado estas kiel granda piramido: la internaciaj gvidantoj ĉe la supro, sub ili la pluraj aroj de naciaj kaj fakaj gvidantoj, ankoraŭ pli sube la regionaj gvidantoj, kaj ankoraŭ pli la urbaj kluboj, lokaj grupetoj, ĝis ĉe la bazo la individuaj membroj, kiuj pli aŭ malpli efike ankaŭ laboras por la universala movado. La priskribo pri la piramido, farita de la Konsilanto, estis tre simila al tiu, kiun la historia instruisto donis al ni, antaŭ jaroj, pri tiuj de Egiptio kiam li klarigis pri la strukturo de la socia vivo en tiu tempo. Laŭ li, la faraonoj konstruis la piramidojn, inter aliaj kialoj, ankaŭ por montri la lokon de ĉiu enloĝanto en la lando.

Nun, se nia movado estas piramido, kiel asertis la Konsilanto, ni, la homoj en la baza tavolo, la klubanoj de lokaj societoj, estas la subtenantoj de ĉiu pli

supra tavolo. Ni, do, estas la bazo de la tuta movado! Fakte, la verduloj de “La Ora Ŝafpelto” ĉiam diris kaj asertis ke estas tiuj homoj en kluboj grandaj kaj malgrandaj, tiuj kiuj aĉetas biletojn en monataj loterioj favore al la lupago de la kunvenejo, tiuj kiuj fidele ĉeestas la semajnajn aŭ dusemajnajn kunvenojn, tiuj kiuj organizas budojn dum urbaj foiroj, tiuj kiuj skribas al ĵurnaloj pri la movado kaj ĝia valoro al internacia kompreniĝo, kiuj vere estas la bazo de la Movado, la Piramido, laŭ la priskribo far la Konsilanto dum la prelego. En la dua tavolo mi vidas la klerulojn, kiuj legas librojn kaj revuojn, kaj iuj eĉ aĉetas ilin sed la pluaj ilin pruntas aŭ interŝanĝas kontraŭ aliaj pruntitaj antaŭe. En la tria tavolo mi trovas tiujn kiuj legas librojn de ili mem aĉetitaj, eĉ se ofte dum rabatovendadoj de volumoj donacitaj al klubo aŭ federacio far la heredantoj de forpasinta fidelulo.

Mi ne intencas listigi detale la plurajn tavolojn, kiujn mi vidas en nia Verda Piramido sed mi ne povas kompari ĝin al la faraonaj, ĉar tiuj estis faritaj el gigantaj granitaj* blokoj. Kiam la sklavo laborantaj por la faraonoj metis blokon granitan en ĝian lokon, ĝi restis tie ĝis iu kataklisma forto ĝin movos, kaj tio same por ĉiu metita bloko. Kaj jen, ili ankoraŭ restas atendante la kataklismon. Dume, kion pri la Verda Piramido? La blokoj kiuj ĝin formas ne estas de solida granito sed el homoj vivantaj, de ordinara karno, ostoj kaj sango eĉ se la koro de pluraj ŝajnas granita! Oni lokigas ilin ne per forto, tamen eble per iom da persvado, sed plejparte ili lokiĝas memvole, sed malofte ili restas en la sama pozicio. Ili moviĝas en la interno, irante pli alten, aŭ dekstren, aŭ maldekstren. La Verda Piramido pli similas al granda formikejo ol faraonaj monumentoj! Ankaŭ la blokoj en la Verda Piramido, aŭ ĉu mi rajtas nomi ĝin Formikejo?, ne nur ne restas kie oni lokigis ilin, aŭ sin lokigis, sed ofte forkuras sen iu ajn penso aŭ ĝeno pri kiu okupos la lokojn de ili vaktajn. Tio neniam okazis, nek okazas, en

la faraonaj piramidoj! Kara Konsilanto, se vi volas kompari nin al piramido, memoru ke la nia konsistas el homoj, kiuj havas proprajn ideojn kaj mensojn, kaj kiuj ofte ne facile akceptas konsilojn kaj preceptojn pensatajn de alia homo, eĉ se li/ŝi sidas sur la kuspido! Pro tio la grandaj planoj kaj programoj koncipitaj en la alto ne ĉiam realiĝas ĉar la "blokoj" en la malsupraj tavoloj ne estas granitaj sed vivantaj, kiuj pensas kaj agas memvole, eĉ se estas kontraŭ la koncipita konsilo de la alto. Oni povas debati pri la avantaĝo de granito, kiu restas senmova, kaj povas formi piramidojn kiuj restas en la sama loko jam dum pli ol 5,000 jaroj. La Verda Piramido kreskas, iam malkreskas kaj rekreskas denove, la interno bruas kaj eĉ ribelas, iam vulkane, ĉar ĝi vivas kaj 99 jarojn post la meto de la unua bloko, anioraŭ kreskas. La Verda Piramido certe ne estas kiel la faraonaj. Mi dubas ke ĝi estas Piramido!

Alariko.

* Se la blokoj ne estas granitaj, leganto kiu scias pri tio skribu al la Redaktoro.

JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ

De la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987 okazos en Graz, Aŭstrio, Jubilea Esperanto-Konferenco, kiun organizas Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado kun la helpo de Loka Konferenca Komitato kaj apogo de la aŭstria aŭtoritatoj. La Konferenco pritraktos kaj prezentos al la ekstera mondo la atingojn de la Internacia Lingvo sur kultura kampo, precipe en la sfero de sciencoj, en formo de prelegoj, ekspozicioj, publikaj debatoj, recitado de poezio ks. Kompreneble, ne mankos distraj aranĝoj. Dum la Konferenco, en tago fiksota de la LKK interkonsente kun la urbeŝtaro de Graz, estos solene inaŭgurita la monumento "La Espero"

de Jesper Neergaard. La definitiva programo estos publikigita en septembro 1986.

La baza kotizo estas 600 aŭstriaj ŝilingoj ĝis la 1-a de septembro 1986, kaj 700 ŝil. post tiu dato. Ĉiujn informojn donas kaj aliĝojn akceptas la LKK je la konstanta adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, pĉk. 1257.845.

* * *

La INTERNACIA KULTURA kaj TURISMA SEMAJNO (I.K.T.S.) okazos en PAU (paŭo); en sudokcidenta Francio de mardo 22a de julio (alventago) ekde la 9a, ĝis mardo 29a de julio 1986 je la 9a (forirtago).

Prezo inter 1400 kaj 2200 frankoj, laŭ aĝo (25j) kaj aliĝdato. Enestas: 7 plenaj tagoj (ĉambro, manĝoj) 6 ekskursoj kaj urbvizitoj. . . . muzeoj, kulturaj aranĝoj.

Tuj petu plenajn informojn kontraŭ 2 resp. kup. al ESPERANTO-PAU-ADOUR.

C. S. Pépinière

av. R. Schuman, F 6400 PAU

* * *

NEKROLOGOJ

Mary Claziena **Groen**, Ilford, Londono mortis je la 16-a de Februaro, 1986 84-jara, membro dum 55 jaroj. Fidela anino de la Ilford-Grupo kaj Orienta Esperanto-Federacio dum multaj jaroj.

F-ino **Elsie L. Parson**, 91-jara mortis je la 2-a de Februaro, 1986. Aktiva anino de la Bristol Esperanto-Klubo kaj reprezentanto por la Okcidenta Esperanto-Federacio dum multaj jaroj. Ŝi estis tre vojaĝema kaj eĉ instruis Esperanton en Hindujo kaj Japanujo. Ŝi laboris por Esperanto dum la tuta vivo.

D-ro William **Lightfoot**, Isle of Man, ano dum pli ol 50 jaroj mortis en Februaro, 1986. Unue instruisto kaj poste lekcisto en Unesko li multe uzis Esperanton kaj akiris multe da daŭraj eksterlandaj amikoj pere de ĝi. Kondolencoj al lia vidvino kaj familio.

NEVIDITA DANĜERO

La urbo en kiu ĉi tiu rakonto okazis estas tre populara, marborda vizitejo. Tia urbo kie somere homoj amase venas el ĉiuj partoj de la lando po miloj, por trovi rifuĝejon for de la hejmurbo, la ĉiutaga ĉirkaŭaĵo, kaj laboro. Krom bela sabla ŝtando, ĉi tiu urbo havas multe da allogaĵoj por la vizitantoj, inkluzive grandan endoman naĝejon. Nu, eble ĉar dum la varmegaj someraj tagoj estas pli malvarmete endome, tiu naĝejo estas tiel populara inter la vizitantoj, kiel la bela strando, kie oni povas kuŝi aŭ naĝi senpage. Tial, dum la feriaj tempoj, la naĝejo ofte estas unu el la plej homplenaĵoj en la tuta urbo.

Lun posttagmezon mezsomere, dum la suno varme brilis, multaj vizitantoj kaj loĝantoj el la urbo amasiĝis en la naĝejon. Interne de la granda, vitra konstruaĵo, ĉiuagaĵaj personoj naĝis kaj plaŭdis en la naĝbaseno, aŭ sidis ĉirkaŭ la rando, parolante unu al la alia, aŭ ĝoje kriegante al la enakviĝintoj. La tuta atmosfero pleniĝis per bruego, kaj per trembrila sunlumo, reflektata de la akvo.

En la homplena akvo staris dekjara knabo. Mi scias tre malmulton pri ĉi tiu junulo, krom ke li feris en la urbo kun siaj gepatroj, kiuj lin permesis iri sola al la naĝejo, dum ili mem vizitis kelkajn vidindajn. Nur dubeme kaj maltrankvile ili permesis al li iri tien sola, tial ke li ne scias naĝi. Sed tion ili faris pro lia forta riproĉo, ke dekjara knabo ne ĉiam bezonu la kuneston kaj zorgon de siaj gepatroj. Plue, li deklaris, ke li estos tute sekura, ĉar li restados en la malprofunda ekstremo de la naĝbaseno. La knabo ja intencis restadi en malprofunda akvo, kaj post lia alveno ĉe la naĝejo, li vadis inter infanoj kaj aliaj nenaĝantoj en tiu ekstremo de la naĝbaseno kie la akvoprofundo ne superis du futojn. Tie li feliĉe pasigis unu horon, rigardante la naĝantojn, kaj ludante en la varmeta akvo.

Tamen, junuloj ofte ne estas prudentaj,

kaj post iom da tempo, venis al li en la kapon, ke estus interese marŝi iom en la direkto al la profunda ekstremo por eltrovi kiel longe for li povos marŝi ĝis la akvo ektuŝos lian mentonon. Ŝajnis al li, ke tion fari, estus tute ne danĝere. Malrapide li vadis trans la klinitan ŝtandon de la naĝbaseno en pli kaj pli profundan akvon. Kiam la akvo atingis ĝis lia brusto, li haltis momente, kaj sin demandis, ĉu li devus daŭrigi sian enakvan promenon. Li ĉirkaŭrigardis kaj vidis nur la feliĉajn vizaĝojn de la amaso: viroj, virinoj kaj infanoj, ĉiuj ridantaj kaj ludantaj. Tia vido pleniĝis lin per sento de trankvila sekureco. Refoje li vadis antaŭen kaj malsupren en helan, ondetantan akvon, ĝis la ŝultroj subakviĝis, kaj poste ankaŭ la kolo, kaj fine la mentono tuŝis la ondetojn. Atinginte sian celon, la knabo reve rigardis la scenon de ĉi tiu vidpunkto, kun nur la kapo elstaranta super la akvonivelo.

Tiumomente, naĝanto rapide perternaĝis apude, produktante ondegon kiu superiris la nazon de la knabo, kaj pleniĝis lian buŝon per akvo. Granda timo subite lin tenegis, kaj tuj li batalis por sin turni eskape en pli malprofundan akvon. Sed, dum liaj membroj luktis kontraŭ la akvo, ŝajnis al li kvazaŭ potenca mano levis lin korpe, kaj, post unu momento, milde mallevis lin ree. Kun hororo, li konstatis, ke, dum la levigo, ia subakvofluo estas portinta lin iom en la direkto al la profunda ekstremo, kaj sekve, ke li nun staras ĝisnaze en pli profunda akvo. Luktante denove retiriĝi, li malfermis la buŝon por krei por helpo, sed akvo tuj enverŝiĝis en la buŝon kaj gorgon, kaŭzante lin sufoki kaj balbutaĉi. Refoje la nevidebla mano levis lin, milde elŝovante lian kapon el la akvo. Freneze li ŝvingis la manojn por atentigi iun pri lia malfeliĉa stato: sed neniu rimarkis la malgrandajn manojn, kiuj vane ponardis la aeron. Refoje, li

penis kriegi: sed pro sufokado kaj senspireco, li nur povis eldiri "He . . ! Hel . . !", antaŭ ol malleviĝi denove sub la akvosupraĵon. Kiam, post kelkaj sekundoj, liaj okuloj kaj buŝo reaperis super la akvo, li denove penis eligi ian sonon, sed ŝajnis al li en la menso, ke lia balbutaĉanta voĉo estas tiel malforta, ke nepre ĝi ne aŭdiĝos super la bruego. Ankoraŭfoje li malleviĝis, nerimarkita, senpove enspirante akvon, kaj ekperdante la konscion.

El ie venis forta mano por tiri lin supren. Li ekvidis ruĝan naĝkostumon kaj aŭdis mallaŭtan, virinan voĉon, diranta: "Ne timu, ne timu, mi tenas vin." Per unu brako la virino ĉirkaŭpremis lin, kaj per la alia ŝi naĝis, kriegante: "Ni pasu! Ni pasu! Infano preskaŭ dronis!" Ŝi naĝe alportis lin al la rando, kie multaj brakoj estis etenditaj por preni la duondronintan korpon.

* * * *

En la oficejo de la naĝejo, la gepatroj de la knabo aŭskultis blankvizaĝe dum la naĝejestro klarigis al ili la aferon koncerne ilian filon. "Via knabo estis tre bonŝanca," li diris, "ĉar, pro la amaso, kaj la agado kaj bruego, neniu rimarkis la akcidenton, krom la virino."

Kompreneble, la gepatroj deziris sin prezenti al tiu virino por danki ŝin.

"Bedaŭrinde, ŝi jam foriris hejmen," diris la estro, "sed, se vi venos denove, vi eble renkontos ŝin, ĉar ŝi estas ofte kliento ĉi tie. Ja estis bonŝance por la knabo, ke ŝi vizitis hodiaŭ. Tiu virino! Tia akuta aŭdsento . . . por aŭdi, ke la knabo dronas! Kvankam, kompreneble, la agadoj de la aliaj naĝantoj ne malatentigus ŝin . . ."

La gepatroj demandeme rigardis la estron.

" . . . ĉar ŝi estas tute blinda."

LAŬ MIA OPINIO . . .

Mi ĵus tralegis la artikolon "Granda Sukceso en Sofio . . ." (BE, marto/aprilo 1986, p.125). Pri tiu Rezolucio de la Ĝenerale Konferenco de Unesko, akceptita la 8-an de novembro 1985 en Sofio, mi skribis iom detalan analizon atikolon en la revuo HORIZONTO. Ĉi tie mi nur deziras korekti unu el la eraroj pri faktoj. Skribante pri la konata, principe grava Rezolucio de la 10-a de decembro 1954, la aŭtoro de la artikolo en BE diris: "Akceptite precize tridek unu jarojn post la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto _ rezolucio, kiu fine kondukis al starigo de konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko _ la nuna rezolucio." Fakte, la konsultaj rilatoj kaj la Rezolucio de 1954 estis du tute apartaj aferoj, ne dependaj unu de la alia. La konsultaj rilatoj estis atingitaj sen kiaj ajn problemoj, per unuanima decido de la Ĝenerala Konferenco la 8-an de decembro, t.e. *post kiam* la Programkomisiono estis rifuzinta la projekton de Rezolucio, prezentitan de Meksikio, La Rezolucio, per kiu Unesko "notis la rezultojn, atingitajn pere de Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo" "rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko" (tiam, kompreneble), estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en la lasta plenkunsido la 10-an de decembro.

Evidente, la establo de la konsultaj rilatoj la 8-an de decembro nek estis, nek entute povis esti sekvo de la Rezolucio de la 10-a de decembro. Detaloj pri tiu tuta afero troviĝas en la verko *Esperanto en Perspektivo*, ĉap. 22.3, precipe p-oj 768-773.

Ivo Lapenna

Fair enough

Responde al S-ro Rossetti pri la traduko de "fair enough", mi devas diri ke rilate al anglo-parolantoj kaj studentoj de tiu lingvo "lojala" tuj signifas "loyal"

La supra rakonto estis verkita de studanto de la Supera Kurso de EAB en la kadro de la lecionoj.

– kiu estas alia afero – pliĝuste ol “fair enough”.

La vorto “fair” devas esti ĉiam diverse tradukita laŭ la kunteksto. Ekzemple, “a fair exchange” estas “egalvalora interŝanĝo”, sed “That’s not fair!” estas “Tio ne estas egalrajte!”. Estas cirkonstancoj pro kiu “honesta” signifas “fair”. Ekzemple “a fair reply” estas “honesta respondo”, “a fair deal” estas “honesta negoco”.

Kiam “fair” signifas “equitable,” “justa” estas la taŭga adjektivo. Ekzemple “fair enough” estas “sufiĉe justa”, sed estas cirkonstancoj pro kiu “sufiĉe agrabla” aŭ “sufiĉe taŭga” signifas “fair enough”. Fair enough?

G. H. McCluskey.

Ĉar, kiel S-ta Sebastiano, mi estas alfapata de pluraj flankoj (n-ro 869), nome de Rik Dalton kaj Sally Phillips, permesu, ke mi reagu al ambaŭ en sama letero.

Se Rik opinias, ke mi ne sufiĉe laŭdis lian virtuozan tradukon el Thomas Hood, li kompreneble rajtas okupi preskaŭ plenan paĝon por korekti la mankon. Sed ĉar lia traduko devas valori, ne por la angloj, sed por la cetera mondo, kial ne simple sendi sian provon al internacia organo, ekz. *Literatura Foiro* por konstati, per akcepto aŭ rifuzo, la trafecon de lia poemo?

Kaj ion tre similan mi diras al la ĉarma Sally (hu! mi jam pekis per tiu epiteto!). Se la antiseksismo estas por ŝi grava, ĝi do estas mondskala problemo kaj ŝi devas agiti pri tio en internacia areno, ne sur la paĝoj de iu eta landa gazeto. Sed pri la frazo: “li elturniĝu kiel li povas” mi profunde petas ŝian pardonon. Kompreneble mi devis diri “oni elturniĝu kiel oni povas,” aŭ “tiu elturniĝu laŭpove.”

Reto Rossetti

Interpunkcio

En via ĝemela eldonaĵo “Esperanto News” por Mart/Aprilo 1986 aperas artikolo de Albert Goodheir pri la uzo de la

komo en Esperanto. Bedaŭrinde, en mia letero en LBE por la sama periodo aperas du eraroj pri tiu interpunkciaĵo.

Mi ne scias, ĉu la kulpo estas la mia (malgraŭ vortprocesilo, lerta tajpisto mi ne estas) aŭ ĉu intervenis preskoboldo, sed ĉu mi rajtas korekti?

Unu el la eraroj temas pri ellaso de komo kaj ne lezas la signifon sed la alia estas iom pli grava.

La linio: “Esperanto ja estas – jes, estas adekvata” devus teksti: “Esperanto ja estas – jes estas – adekvata”.

La entruda komo kaŝas la fakton, ke mia intenco estis uzi la vorton “jes” kun la signifo “malne” por montri pli pozitivanaf irmativon ol nura ellaso de la “ne”.

Tian uzon mi neniam vidis skribe, sed lernis de la lerta debatisto W. Green kiu konvinkis min, ke ĝi ne estas nur sinonimo de “ja”. “Ja” nur plifortigas, “jes” en tia kunteksto forte spitas.

Ekzemple, se mi diras, ke la vetero ne estas bona, vi povas forte konsenti dirante “Ĝi ja ne estas bona” aŭ malkonsenti dirante “Ĝi ja estas bona” sed ĉu ne multe pli forta estas diri “Ĝi jes estas bona”?

Eble nuanco, sed el tiaj kreskas la stilo de Esperanto.

Denove pri la temo de lingva seksismo: mi scivolas, kial oni kondamnas la senperan uzon de -in- post adjektiva radiko. Kvankam Reto Rossetti kaj aliaj asertas, ke, malgraŭ la principo de neceso kaj sufiĉo, tia formo nur taŭgas por poezio, neniuj donas eksplikon. Ĉu estas kialo? Mi ne disputas, nur scivolas.

Sally Phillips plendas, ke Reto Rossetti ignoras aŭ insultas virinojn per la uzo de la vorto “li”. Tamen, laŭ Zamenhof (L.R.), ĉi tiu pronomo estas uzbla por ajna genro. Ĉu tio ĉi ne estas plua pruvo de lingva diskriminacio kontraŭ la viroj? Ĉu ni ne povas teni ekskluzivan prepozicion por nia sekso, kian havas la virinoj?

Rik Dalton

Nigra Listo

La Glasgova Esperanto-Societo, en sia kunveno de 6a de februaro, unuvoĉe

esprimis malaprobos de la publikigo de 'nigra listo' de parlamentanoj kaj deziras, ke EAB distancigu sin de tiu malbonefika propagandometodo.

Albert Goodheir, sekretario

P.S. Mi legis la leteron de Prof. Nisbet kaj tutkore aprobas ĝin. A.G.

Kune kun la lasta numero de *Brita Esperantisto* mi ricevis la folion de Esperanto Lobby enhavantan la "nigran liston" kaj mi legis la artikolon titolitan "Emocia Reago".

La reago ja rajtas esti emocia! Ĉu nia esperanta movado ŝajnas toleri konduton tiel maldecan kaj stultan kiel la publikigon de la "nigra listo"? Mi demandas al mi mem, kion *mi* sentus, se, ne respondinte al invito subteni iun entreprenon, mi trovus min nomita sur vaste cirkuligita folio kaj priskribita kiel malamiko. Ĉu mi ne indignus kaj decidus, ke mi ne deziras pluajn rilatojn kun la koncernaj personoj, kaj ke mi avertos la publikon kontraŭ implikiĝo en la senskrupulan entreprenon?

La listo inkluzivas eminentajn kaj respektatajn politikistojn. Kelkaj el ili estas miaj amikoj. Mi simpatias kun la Joint Council of Language Associations, kiu asertas, ke ĝi "deziras distancigi sin de la metodoj, kiujn vi utiligas por antaŭenigi viajn celojn". Tia reago estas kaj komprenebla kaj honora.

Ne sufiĉos, ke ni forneu la respondecon de BEA kaj ETA pri la "nigra listo": ni devas publike kondamni ĝin. Alie, ni riskas perdi multe da bonvolo.

Stanley Nisbet

KONFERENCO DE N.E.M. EN ATENO

La 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto Movado okazos en Ateno, la ĉefurbo de la Eŭropa civilizacio, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986. La ĉeftemo estas "Paco kaj Libereco". Kompetentaj lekciistoj pritraktos ĝin el filozofia, etika, historia,

politika, ekologia kaj jura vidpunktoj. Okazos ankaŭ ĉefkunvenoj de ICNEM, Internacia Esperanto-Aocio de Juristoj, Filozofia Asocio Tutmonda, la 2-a Internacia Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, verŝajne aliaj kunvenoj kaj debatoj. Krome: interkona vespero, bankedo kun balo, vizitoj al vidindaĵoj de Ateno, tuttaga ekskurso al la regiono Korinto-Epidaŭro-Mikeno-Hefpliono, postkonferenciaj ekskursoj. La konferencejo – la unuaranga Esperia Palachotelo – estas klimatizita.

Baza aliĝklotizo: 4800 drakmoj Aliĝojn akceptas kaj ĉiujn pliajn informojn donas LKK je la konstanta adreso: S-ino Adda Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno-816, Grekio.

ĈINAJ ELDONAĴOJ

Bukedo al vi. Mikronoveloj. Pekino 1984. 95p. Kolekto de 24 noveletoj pri la ĉiutaga vivo en nuntempa Ĉinio. Tre rekomendinda legaĵo, kiel pro la klara lingvaĵo, tiel ankaŭ pro la interesa enhavo. Aparte taŭga por progresantoj.

Mia vivo. Pekino 1984. 127p. "Bukedo al vi" estas fikcia: en tiu ĉi libro parolas rekte al vi pri sia vivo ĉinoj "el diversaj socitavoloj, inter kiuj troviĝas laboristo, kamparano, ŝoforo, maristo, flegistino, advokato, arkeologo, dancistino, biologo, lamao kaj eĉ frato de la lasta imperiestro de Ĉinio". Kiu interesiĝas pri tiu granda lando – do verŝajne ĉiuj esperantistoj en Britujo – tiu legos la libron kun plezuro.

DENOVE HAVEBLA!

FULCHER & LONG
English-Esperanto Dictionary
Represo de la 1963-a eldono
£5.25 bind. £4.10 broŝ.
inkl. de sendkostoj en G.B.
Mendu ĉe B.E.A.

NOVAJ LIBROJ

Trojaninoj kaj Ifigenia en Taŭrido de Eŭripido. Elhelenigis D-ro A. Goodheir. Eld. Kardo, Glasgovo 1985 134 p. 21 cm broŝ.

La eŭropanoj ne inventis la teatran arton, sed en Ateno antaŭ dudek kvin cent jaroj la eŭropa teatro brile debutis. Inter la plej gravaj grekaj majstroverkistoj estis Eŭripido, kiu naskiĝis dum la milito inter Sparto kaj Ateno, kaj poste uzis siajn verkojn por trakti la homan tragedion de la milito. El liaj 90 teatraĵoj nur 18 tragedioj kaj unu satira dramo restas. D-ro Goodheir tradukis du gravajn tragediojn.

Por kompreni ilin oni devas konstati la historiajn aludojn. La tradukinto provizas bonan priskriban skizon, kaj ankaŭ bonajn resumojn de la intrigoj. Ambaŭ dramoj rilatas al la tragedia situacio post la dekjara milito, kiam la grekoj fine venkis Trojon, kaj ĝin detruis per fajro. Plejparte la viroj mortis dum la milito, kaj la vidvinoj kaj infanoj de la falintoj iĝis sklavoj de la venkintoj.

En "La Trojaninoj" Eŭripido prezentas la fatalojn de tri virinoj: Hekabe, vidvino de Priamo reĝo de Trojo; Kassandra, ŝia filino; kaj Andromake, bofilino de Hekabe kaj vidvino de Hektoro, kies fileton oni ĵetas de sur la muroj de Trojo. "Ifigenia en Taŭrido" traktas la fuĝon de Oresto post lia murdo de sia patrino Klitemnestro, lian trovon de la supozite morta fratino, Ifigenia, inter la negrekaj enloĝantoj de moderna Krimeo, kaj lian liberigon de la malbeno pro la murdo. Ĉi tie ni troviĝas en mondo de homoferado, kvereloj inter la dioj, kaj suferado de senkulpaj homoj. En ambaŭ dramoj ni renkontas perfortojn kaj kruelegajojn prilamentatajn sed, iasence, akceptatajn. La Fato neŝanĝebla regas. La kapricoj de la dioj findecidas.

La traduko estas glata kaj lingve facila. La voĉoj de la personoj homece sonas. Supozeble se oni prezentus ĉi tiun tradukon en teatro, la spektantaro ĝin kom-

prenus. Tio gravas, ĉar Eŭripido verkis, kiel Ŝekspiro, por la ĝenerala publiko. (Evidente, la tragedia teatro de Ateno ne havis la samajn konvenciojn kiel la moderna).

Tamen . . . Goodheir tro oferis de la originalo por atingi sian tradukon. (La grekaj tekstoj estas, kiel tiuj de Ŝekspiro, plenaj je esprimoj kaj nocioj, kiujn devas trakti la tradukanto). Nomojn li ne konsekvence traktas: Helena, sed Hekabe kaj Andromake. Ĉiuj finiĝas per *e* en la greka, kaj la rekomendo de Kalocsay en 1931 uzi *a* por innomoj estas nun ĝenerale sekvata en Esperanto. En "Ifigenia en Taŭrido" li tradukas la nomon de la maro *Eŭksinos* per *Malgastama* (la greka signifas *gastama*) tradukante la signifon komprenatan, kaj tiel evitante piednoton, tamen li *ne* tradukas la nomon *Simplegadoj* (kies finigon li esperantigas); la greka *Sumplégades (petrai)* signifas *Kunfrapantaj (rokoj)*, kaj tion li piednotas.

En grava kaj patosa sceno de "La Trojaninoj" linioj 1313-1315 tekstas: *Priame, Priame, su men olosmenos/atafos afilos/ atas emas aistos ei*. Li tradukas iom banale: *Ho Priamo, Priamo!/sen gefiloj, sen tomoj/ĉu vi scias pri tio?* Laŭvorte la originalo tekstas: *Ho Priamo, Priamo! vi pereigita / sentomba senamika / pri miaj malutiloj estas senscia*. (Egale eblas traduki la frazon demando). La tradukinto, do, perdas la poezian valoron de la triobla *a-* (sen) de *atafos, afilos, aistos*, kaj mirige tradukas *afilos* per *sen gefiloj* anstataŭ per *sen amikoj*.

En la sama dramo, kiam la reĝo Menelao fine ricevas sian edzinon, li diras: *Mi ekkaptas Helenan*. Verŝajne pro tio, ke la greka *heirósomai* devenas de *heir* (mano). Goodheir tradukas: *Mi metas la manon sur mian edzinon*, kio povas misbildigi la aferon por la nescianta leganto! Edzinoj estis posedaĵoj. La greka verbo ĝenerale signifas: *submeti, venki, kapti*. (Notindas, ke en PV la unua difino de *kapti* estas: *Ĵeti subite la manon sur ion aŭ iun*).

Mi ne plu traktu detale la tekston, kiu,

laŭ mia opinio, tro ofte ne transdonas nuancojn, aŭ eĉ foje la celitaĵon de Eŭripido.

Ĝi estas utila traduko, se iom maldensa kompare kun la originalo. Sed mi faras al mi la demandon, kial traduki teatraĵon? Se por prezenti sur scenejo, ĉio devas esti komprenebla sen amaso da piednotoj. Tikla problemo, sed ne nesolvebla. Se por kabineta legado, mi atendus poezian tradukon pli severe konforman al la majstra teksto.

Kun rezervoj, bonvena kontribuo al nia tradukita literaturo.

Don Lord

Varmega Kamparo, de Zsigmond Móricz. El la hungara tradukis István Nagy. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio. 169 paĝoj.

Zsigmond Móricz naskiĝis en 1879 kaj li estis 29-jara kiam aperis lia unua novelo. En 1929 aperis "Varmega Kamparo". La aŭtoro en siaj verkoj priskribas la sociajn morojn de la hungara popolo, unue kiel parto de la aŭstro-hungara imperio kaj poste kiel memstara ŝtato. Ĉi tiu romano malfermiĝas per renkontiĝo en restoracio de hotelo en provinca urbo. Tie estas rezervita tablo kie la "granduloj" de la urbo iras regule por babili kaj interŝanĝi novaĵojn pri la vivo kaj homoj de la urbo. Malgraŭ aludoj al Vieno, evidentiĝas, pro menciitaj eventoj, ke la okazintaĵoj de la romano okazas iam post 1920, la periodo kiam la kafejoj kaj restoraciaj renkontiĝoj floris ne nur en Hungario sed en pluraj aliaj partoj de Eŭropo ankaŭ.

Je la komenco de la romano la pluraj protagonistoj kolektiĝas ĉe la tablo kaj ni legas nomon post nomo de la diversaj homoj kaj la komentoj de ili diritaj. Ĉi tiuj paĝoj ne estas facilaj por legi, sed la intereso vekiĝas kiam Laci Avary mortas. Ĉu li sin mortpafis? Ĉu li estis mortpafita? Tiam la kerno de la verko komenciĝas kaj ni vidas la virojn de la restoracia rondo intrigantaj por atesti kiamaniere Avary mortis, ĉiu laŭ propra kaŝita celo

aŭ pro malico al alia. La intereso por vidi la rezultojn daŭras ĝis la fino. De tempo al tempo la prozon mi trovas peza kaj obtuza. Ĝi trepidas pli ol fluas kaj oni ricevas la senton ke la tradukinto sekvas la ritmon de la originala lingvo iom tro rigore. Esprimoj, pli hungaraj ol internaciaj, aperas tre ofte. Malgraŭ tio, indas legi la romanon, ĉar ĝi bone prezentas la vivon de ambiciaj etburĝuloj en provinca urbo dudek-kvin jaroj antaŭ la grandaj ŝanĝoj kiuj venis en la landon kiel rezulto de la lasta milito. Por psikologuloj la romano estos kiel verko de Sherlock Holmes por detektivuloj. Ĝenas al mi la manko de flua internacia stilo en la verkado, kaj pro tio la Postparolo, de Georgi Mihalkov, trafas la atenton ĉar montras kiel agrable vortoj povas vibri en la Internacia Lingvo.

Amador Díaz

Printempa danco. Maltlingva poemaro de Mario F. Bezzina kun paralela traduko de Carmel Mallia. 21 x 15 c.. 35 p. Eld. Literatura Viglo 83.

Antaŭ iaj dek jaroj mi recenzis plifruan broŝuron de Carmel Mallia, el du longetaj poemoj de Dun Karm, La mio, kaj Lia pretero, aŭ simile. Ambaŭ paŝis kadence kun tembro de aŭtentika poeta voĉo kaj mi konvene ilin laŭdis. Poste aperis Kapriĉaj raketoj (pliĝuste petolaj petardoj): aforismaj strofetoj sen spaco por similaj elsonoroj, kaj nun Mallia denove prezentas maltan poeton, Mario Bezzina, naskitan en 1950. La kovrilo trafte montras kvinpintan stelon sur malta kruco kaj interne la sorĉaj originaloj (en tiu rara arabdevena idiomu kun pra-feniciaj spuroj kaj videbla itala influo) forme spegulas la tradukojn kontraŭflanke.

Bezzina estas lirika poeto de l' observo. Tiaj ne estas multaj, almenaŭ inter niaj originalaj poetoj: Hilda Dresen, iom da Mihalski, Hohlov kaj Boulton, kaj inter tradukitaj poetoj mi pensas unuavice pri Tadijanoviĉ, Kanto al mia koro, tradukita de Josip Velebit. Ĉefa diferenco inter Tadijanoviĉ kaj Bezzina estas, ke ĉe la unua la observo estas simpatie humana,

dum ĉe Bezzina temas pri buntaj vinjetoj de tia aŭ alia sceno en parko, ĉe rivero, apud preĝejo, kie la homoj ŝajnas plie pitoreskaj detaloj ol io, kio animas la poemon kaj ĝian etoson. Kaj tamen ne mankas versoj obsedaj kaj teneraj. La variaj poemformoj kvazaŭ venas spontane dum inspiro de l' kreado, tamen kun trafa, svelta konturo, kaj la trasenta interpreto de Mallia tion redonas:

akveroj
glaciaj elŝprucadas
el fontano
apuda . . .
forportate
de varmaj ventetoj
foren . . .
foren . . .
mian vizagon
malsekigante
laŭte . . .
laŭte . . .

Mi dankas al Carmel Mallia, ke li peris al ni kelkajn neforgeseblajn juvelojn. Kaj nun sekvu baldaŭ la Malta antologio, ĉu?

R. Rossetti

La feliĉa birdo. Pekino 1984. 49p. **Papilia fonto.** Pekino 1984. 67p. **Magia ŝipo.** Pekino 1984. 75p. Ĉinio estas lando multnacia, kaj tiuj ĉi tri libretoj konigas al ni popolajn rakontojn el diversaj nacioj: tibetanoj, hanoj, bajoj, uĝuroj tajoj, ĝuangoj. Tre taŭga legajo por progresantoj, precipe pro la bela klara lingvaĵo kutima ĉe niaj ĉinaj amikoj.

Dek ses urboj de Ĉinio. Pekino 1984. 174p. **Pitoreska Pekino.** Pekino 1984. 72p. **40 vidindaj lokoj en Ĉinio.** Pekino 1984. 251p. **Albumo pri Ĉinio.** Pekino 1984. 96p. Feliĉe nun Ĉinio bonvenigas vizitantojn kaj turistojn – kaj, kompreneble, la venontjara UK okazos en Pekino. Sekve Ĉina Esperanto-Eldonejo komencis informadi nin pri la vidindaĵoj en Ĉinio, pere de ĉi tiuj belaj libretoj, ilustritaj (plejparte kolore) per tiuj belaj fotografaĵoj, kiaj estas konataj al ni en EPĈ.

MALLONGE

9a Esperantologia Konferenco

Kadre de la 71a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino okazos la 9a Esperantologia Konferenco. La kadra temo estas "Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto".

Estas bonvenaj prelegoj pri la temo, ne pli ol 20 - 30 minutaj. La konferenco celas prilumi la ecojn de Esperanto, aparte, se eble, kompare al nehindeŭropaj lingvoj.

Tre gravas pro tio la kontribuo de nehindeŭropaj prelegantoj, kiujn ni aparte bonvenigas.

Proponojn por kontribuoj bv. sendi al d-ro Detlev Blanke, DDR-1141 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05.

* * *

Triakongreso de la "Flandra Esperanto-Ligo"

Ĝi okazos la 29an, 30an, kaj 31an de aŭgusto '86 en la fama marborda urbo Blankenberge.

Blankenberge estas la programo i.a.: vizito al la plivastigata haveno Zeebrugge (=Mar-Bruĝo); vizito al la najbara mezepoka lumigita(!) urbo Bruĝo; du "plenaj kunsidoj" pri "Esperanto kaj la Aktualeco" kaj pri spertoj kaj projektoj de en- kaj eksterlandaj grupoj.

Vi povos ankaŭ admirati la en okcidenta Eŭropo faman florsekvantaron (Corso).

Informojn kaj aligilojn liveras la sekretario: R. Iserentant; Sint-Pietreskerklaan 59,8000 Brugge Belgujo.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from: Dr. K. M. Hall, 37 Granville Court, Cheney Lane, OXFORD, OX3 0HS.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj.
Antaŭpagenda.

Loughborough University. Courses in Esperanto at intermediate and advanced levels are once again included in the Summer Programme from 27 July – 2 August. Tutors: Don Lord & Stephen Thompson. Write for a brochure to The Centre for Extension Studies, University of Technology, Loughborough, Leics. LE11 3TU.

Practical Esperanto. 19-21st September 1986. Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Allan Nutton, Stephen Thompson. Book early for this increasingly popular weekend! Forms and information from the Principal, Knuston Hall.

“**La Migranto**”, riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelajoj, flaŭro kaj faŭno, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj, estas eldonata de la Esperanto-Fako de Turista Asocio “La Naturamikoj” (TANEF). Ĝi aperas kvaronjare kaj kostas nur 7.00 svisajn frankojn. Petu senpagan provekzempleron de: Liesel Nagel, Rosegerstr. 17, D-7800 Freiburg, F. R. Germanio.

VOLAS KORESPONDI

Silvan Vella, BIKA, Flt 3, Hse Est, Pawla, Malta, 12-jara knabo lernas Esperanton en la lernejo volas korespondi kun Britaj geknaboj.

Firizs Attila, Budapest, 1215, XXI, Ady Endre ut 43, Hungario 18-jara laboranto kun angla knabino aŭ knabino. Intereso: Sciencifiksio, korpoevoluiĝo (fortiĝo), verkado.

Yu Xi Mei, Hua Feng-a Porcelanaĵa Fabriko, Jingdezhen, Jiangxi Provinco, Ĉinio, 21-jara laboristino eklernis Esperanton en 1983, volas korespondi kun gebritoj.

S-ro LI JI, 2-15 Zhenkang jie, LIAOYUAN shi, Jilin sheng, Ĉinio 24-jara volas korespondi kun mezaĝaj instruistoj kaj teknikistoj ankaŭ pri interŝanĝado.

BALOGH Pal, Debrecen, Micsurin u. 106.115, 4031 Hungario 31-jara oficisto, edzo kun du junaj infanoj, edzino ankaŭ samideanino, volas korespondi kun gebritoj. Intereso: - sporto, muziko, intelektaj ludadoj kaj teknikaj objektoj.



F-ino Agnes Ida SZENTES, Ifyusagi Lakotelep 13, 115, 5400 Mezötur, Hungario 30-jara komencantino volas korespondi kun eksterlandanoj. Intereso: veturado, turismo, medicina scienco, literaturo, biologio kaj belartoj. (foto).

Katarina Mróz/23-jara studentino pri oligofreni-pedagogio/ – PL 80-266 Gdańsk, al. Grunwaldzka 176/6, Pollando – deziras korespondi kun samfakaj studentoj kaj kun personoj laborantaj en specialaj lernejoj.

Marko Minkisiewicz, P.P.R. 6 m 10, PL 88-100 Jnowroclaw, Pollando 27-jara lernanto de Esperanto – skribas, ke li estas ‘geodeto’ Kolektas p.m. diskojn. Intereso: muziko, fotoj, geografio, eksursoj, filmoj.

Mehrdad Nouraddin, P.O. Box 798171376, MINAB, IRAN 19-jara abituriento volas korespondi kun Britoj.

S-ro Iraĝ Fazel, plak: 1/22, La:Sheakh St: Namju, Kodepost 16146, Tehran, IRAN studento en universitato volas korespondi kun Brita samideanino. Li estas 20-jara. (Adreso ĉe Mr. Nuruzian).

D-ro SINA, Dermatologo, P.O. Box 637, Arak, IRAN volas korespondi kun samideanoj en Britujo.

Ryszard Djakow, 41-902 BYTOM, Pl. Wojska Polskiego 7/67, Pollando 35-jara ekonomikisto, laboras en vojaĝoficejo, intersiĝas pri la Esperanto-movado, katolika movado kaj ekumenismo, historio, turismo, vojaĝo, sporto eblas reciproka gastigado.

Donĉev Kavargikow, et.III, VHA Kon-stajtbl, ul.Greaf Ignaliev, No. 58 ap.8, 8600 Jambol, Bulgario volas korespondi kun britoj.

S-ro Mohammed Mehry, St. Ansariea, st. 5 Moallem No. 32, c.o. 45258, Zanjan, IRAN volas korespondi tutmonde.

Antoine Ciappara, “Carann House”, Guzi Galea Street, Qormi, Malta, 12-jara knabo kiu lernas Esperanton en la lernejo. Volas korespondi kun Britaj geknaboj en Esperanto.

SHELLEY CELEBRATION

Saturday, May 24th – 11 a.m. to 5.30 p.m.

ALTWOOD SCHOOL, MAIDENHEAD

£3.00 waged, £2.00 unwaged, for ½ day.

Speakers: PAUL FOOT, E. HEFFER, D DAVIES, MPs

LA BRITAJ ŜELEISTOJ volas vidi pli Esperantajn tradukojn de la poemoj de P.B.S. Ni nur havas ODO AL LA OKCIDENTA VENTO kaj LA INDIANA SERENADO (trad. Kalocsay).

26th ANNUAL ESPERANTO SUMMER SCHOOL

Intensive Courses at Wedgwood Memorial College

BARLASTON

Stoke-on-Trent ST12 9DG

Saturday 16th to Friday 22nd August 1986

Group A – Beginners; Group B – Intermediate;
Group C – Advanced

Course Fees:

Residents in Staffordshire: £86.00. – Others: £95.00

Pensioners or Disabled in Staffordshire: £77.00. – Others: £86.00

Course Director: Dr. Marjorie Boulton

Enrolment forms from the Warden at the above address